

N° 147
30 septembre
2009


LA INFORMILO

trimestriel
3^{ème}
trimestre
2009

l'espéranto



la langue de l'amitié
sans frontières



esperanto



la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements
Meurthe-et-Moselle (54)
Meuse (55)
Moselle (57)
Bas-Rhin (67)
Haut-Rhin (68)
Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
" Philippe Desforges "
27, rue de la République
FR - 54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO
annuel / jara
14 €
eksterlando
18 €



En avant-première
du Congrès Mondial d'Espéranto de Bjalistok,
OSIEK (1) a ouvert son annuelle université d'été
à Kondoros (Hongrie), du 18 au 24 juillet

Le thème particulièrement attractif -l'humour dans la littérature espérantiste- a suscité de fructueux débats parmi les participants venus d'Allemagne, de Chine, d'Ecosse, de France, de Hongrie, d'Italie, de Grèce, de Pologne, de Roumanie, de Slovaquie, et de Tchéquie. Figuraient également au programme un cours de langue, un éventail d'activités pour les enfants... sans oublier la présence permanente d'un impressionnant service de librairie !

Parmi les auteurs évoqués, Raymond Schwartz a été particulièrement mis à l'honneur par plusieurs conférenciers.

Comme chaque année, un prix spécial a été attribué, -après un vote secret- à l'ouvrage de Spomenka Stimec, *Kroata milita noktilibro*.

Bien évidemment, cette semaine studieuse était entrecoupée de moments de détente très appréciés des congressistes. Nous citerons entre autre les bains en eau chaude dans les stations thermales de *Gyomaendröd* et *Árpádfürdő*, la soirée de détente en plein air dans le village de Hunya pour déguster le fameux *porkölt*, le concert de Jak Le Puil et une randonnée en calèche dont chacun se souviendra !...

C'est Herzberg, *die Esperanto-Stadt* (D), qui accueillera l'université d'été 2010.

A l'issue de la fermeture de la session, à l'invitation de *Laszlo Szilvasi*, (*RET-Info*) une dizaine de participants se sont retrouvés au "jardin espéranto" de Budapest pour une soirée conviviale autour d'un appétissant *gulyás* traditionnel.

Espéranto France-Est	esperanto France-Est	Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la Internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Pol DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC	pol.denis@orange.fr
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro Pol DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammach@mageos.com
Asseseurs	S-ino Liliane BÉRSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	03.87.60.23.66	mirantur@hotmail.com

Abono al La Informilo →	Francio: 14 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement d'adresse à envoyer au trésorier

SOMMAIRE n° 147		
pages	1 OSIEK à Kondoros	18 C et R en Iran
	2 Ours	19 Rue Z -fin
	3 Edito	20 lokaj informoj
	4 Rezolucio UK	21 vélo couché
	5 Résolution UK	22 reportage télé D
	6 Jean-Louis Texier	23 témoignage
	7 AG Bertrichamps	24 / 25 Vinilkosmo
	8 AG Bertrichamps	26 / 27 libro-servo
	9 Kurso-fino Mulhouse	28 Jaci
	10 /12 UK Bjalistoko	29 cotisations
	13 /15 postkongreso Polio	30 anecdotes
	16 IJK Liberec	31 distra angulo
	17 expo St-Dizier	32 fototeko

ISSN 0291 6037 trimestriel bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges – 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur : Pol DENIS Dépôt légal : 30 septembre 2009 Imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole Place de l'Ecole Normale, 55000 BAR-le-DUC N° CPPAP : 0409 G 83517
--



Estimataj gesamideanoj,

En LA INFORMILO vi certe legos diversajn alvokojn al kunlaborado pri agado en turismo. Vi ja ĉiuj konsentas, ke prezidanto de asocio havas la taskon emigi la membraron al laboro. Sed mi ankaŭ scias, ke multaj inter vi tion jam faras propravole !

Mi do certas, ke nia komuna deziro antaŭenigi Esperanton sur la kampo de turismo stimulos vian intereson kaj ke ĉiu inter vi trovos eblecon iel kunlabori.

Antaŭdankon al vi !

Edmond LUDWIG

... Priatentu ! ...

esperanto
France-Est

La retejo de nia asocio **Esperanto France-Est** havas nun jenan adreson:

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Krome eblas ankaŭ atingi ĝin per

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Ambaŭ adresoj havigos al vi aktualigitajn informojn pri estontaj aranĝoj, fotojn pri okazintaj eventoj.

Vi estos informitaj ne nur pri la aktivadoj de nia asocio sed ankaŭ pri la lokaj grupoj

... kaj pri Esperanto !

Multaj ligoj ebligas al vi trovi aliajn interesajn retejojn en Francio kaj en la mondo

pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...



➔ **nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...**



apprendre
l'espéranto

*rapidité ...
efficacité ...*

*deux maîtres- mots
de notre cours
par correspondance !...*

- ★ un matériel adapté
- ★ une technique éprouvée
- ★ un réseau d'animateurs compétents
- ★ un savoir immédiatement opérationnel

"☆☆☆ ?...
-☆☆☆☆ !"



chez soi !

Edmond LUDWIG
26, route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR
03 89 77 52 55

*une diffusion
sur toute la région
...et au-delà !*





REZOLUCIO DE LA 94-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La **94-a Universala Kongreso de Esperanto**, kunveninte en *Bjalistoko* de 25a de julio ĝis 1a de aŭgusto 2009, kun partopreno de preskaŭ 2000 homoj el 63 landoj en la jaro de la 150-a datreveno de la naskiĝo de la kreinto de

Esperanto, *Lazar Ludwik Zamenhof*, kaj samtempe en la *Internacia Jaro de Akordiĝo* proklamita de Unuiĝintaj Nacioj,

diskutinte la kongresan temon "*Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ*", kaj studinte kun aparta atento la vivon kaj verkojn de Zamenhof,

notinte la fakton, ke la urbo kaj regiono de Bjalistoko pli kaj pli rekonas la escepte gravan rolon, kiun Zamenhof ludis kaj daŭre ludas kiel monde rekonata figuro en la morala evoluo de la homaro,

konsciante, ke tiu rekono konkretiĝis interalie en la malfermo de *Centro Zamenhof* fare de la urbaj aŭtoritatoj de Bjalistoko, kaj en propono, ke la Bjalistoka Universitato ricevu la nomon Zamenhof;

memorigante, ke okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Lazar Ludwik Zamenhof Unesko rekonis lin kiel unu el la grandaj personecoj de la mondo, kaj ke tra la jaroj venis multaj similaj rekonadoj pri la meritoj de Zamenhof kiel granda monda pensulo,

kaj gratulante Unuiĝintajn Naciojn pro ĝiaj iniciatoj rilate al la ideo de akordiĝo, tiel esenca en mondo kiun dividas malakordoj pro antaŭjuĝoj kaj manko de toleremo,

konstatas, ke

1 - Per la internacia lingvo Esperanto, Zamenhof kreis unike efikan ilon de internacia komunikado sur neŭtrala bazo, sen favori unu popolon super alia, kaj sen favori unu etnan lingvon super alia, kaj ke tra pli ol 120 jaroj da uzado Esperanto pruvis sian taŭgecon kiel internacia lingvo plene adaptebla kaj adaptita al ĉiuj komunikaj bezonoj.

2 - Tamen, Zamenhof samtempe komprenis, ke lingvo estas kolektiva posedaĵo, kaj konfidis la evoluon de sia lingvo al ties komunumo de uzantoj, tiel ke Esperanto kaj ĝia kulturo fariĝis esence kreaĵo kolektiva, kiu evoluis en spirito de lingva demokrateco.

3 - Tion farante, Zamenhof ankaŭ rekonis, ke utiligo de neŭtrala lingvo en la internaciaj rilatoj helpus konservi lokajn kaj regionajn lingvojn kaj kulturojn kaj la identecon de ties komunumoj.

4 - Zamenhof ankaŭ signife kontribuis, per siaj verkoj kaj agoj, al klopodoj forigi la malamikecon inter la anoj de la diversaj religioj, al forigo de rasaj antaŭjuĝoj, kaj al rifuzo de milito kiel akceptebla maniero solvi disputojn – valoroj same gravaj en la nuna epoko kiel en la epoko de Zamenhof.

5 - Sekve, Zamenhof plene meritas pli da atento ne nur kiel kreinto de lingvo sed kiel persono, kiu strebis al aŭtenta frateco inter la homoj surbaze de plena kaj reciproka kompreniĝo.

6 - Tia frateco povas veni nur kiam la homoj interkompreniĝas en reciproka respekto – procedo, en kiu Esperanto povas ludi kaj jam ludas unikan rolon.

7 - Interkompreniĝo estas esenca paŝo al tiu profunda kaj daŭra akordiĝo, kiu estas la celata idealo de la *Internacia Jaro de Akordiĝo*.

8 - Akordiĝo eblas nur en situacio, en kiu lingvaj diferencoj ne formas baron al egaleca dialogo.

9 - En tiu senco Esperanto estas unike taŭga kiel bazo por daŭra akordiĝo, kaj *Universala Esperanto-Asocio*, per sia atento ankaŭ al moralaj valoroj kaj al respekto de homaj rajtoj, povas signife roli en plenumo de la celoj de la *Internacia Jaro de Akordiĝo*.



Résolution du 94^{ème} Congrès Mondial d'Espéranto



Le 94^{ème} Congrès Mondial d'Espéranto, réuni à Bialystok du 25 juillet au 1er août 2009, avec la participation de presque 2000 personnes de 63 pays, l'année du 150^{ème} anniversaire de la naissance du créateur de l'Espéranto, *Lazare Louis Zamenhof*, et en même temps l'Année Internationale de la Réconciliation proclamée par les Nations Unies,

ayant discuté sur le thème du congrès "*Créer un pont pacifique entre les peuples : Zamenhof aujourd'hui*", et étudié avec une attention particulière la vie et les œuvres de Zamenhof,

ayant noté le fait que la ville et la région de Bialystok reconnaissent de plus en plus le rôle exceptionnellement important que Zamenhof a joué

et continue à jouer comme figure mondialement reconnue dans l'évolution morale de l'humanité,

conscient que cette reconnaissance s'est concrétisée entre autres avec l'ouverture du *Centre Zamenhof* par les autorités municipales de Bialystok, et avec la proposition que l'Université de Bialystok reçoive le nom de Zamenhof,

rappelant qu'à l'occasion du 100^{ème} anniversaire de la naissance de Lazare Louis Zamenhof l'Unesco l'a reconnu comme l'une des grandes personnalités mondiales, et qu'au fil des ans sont venues nombre de reconnaissances similaires des mérites de Zamenhof comme grand penseur de dimension mondiale,

et félicitant les Nations Unies pour leurs initiatives relatives à l'idée de réconciliation, tellement essentielle dans un monde que divisent les désaccords dus aux préjugés et au manque de tolérance,

constate que

1 - Avec la langue internationale espéranto, Zamenhof a créé un outil de communication internationale d'une efficacité unique, sur une base neutre, sans favoriser un peuple au détriment d'un autre, et sans favoriser une langue ethnique au détriment d'une autre, et que tout au long de plus de 120 ans d'usage l'espéranto a prouvé son adéquation en tant que langue internationale pleinement adaptable et adaptée à tous les besoins de communication.

2 - Cependant, Zamenhof a dans le même temps compris qu'une langue est un bien collectif et a confié l'évolution de sa langue à la communauté de ses utilisateurs, de sorte que l'espéranto et sa culture sont devenus par essence une création collective, qui a évolué dans un esprit de démocratie linguistique.

3 - Ce faisant, Zamenhof a également reconnu que l'utilisation d'une langue neutre dans les relations internationales aiderait à conserver les langues et cultures locales et régionales et l'identité de leurs communautés.

4 - Zamenhof a aussi contribué de façon significative, par ses œuvres et ses actes, aux efforts pour supprimer l'inimitié entre les membres des diverses religions, à l'éradication des préjugés raciaux et au refus de la guerre comme manière acceptable de résoudre les conflits – valeurs aussi importantes à l'époque actuelle qu'à l'époque de Zamenhof.

5 - Par conséquent, Zamenhof mérite pleinement davantage d'attention non seulement en tant que créateur d'une langue, mais aussi en tant que personne qui a lutté pour une fraternité authentique entre les hommes sur la base d'une compréhension pleine et réciproque.

6 - Une telle fraternité ne peut exister que lorsque les hommes se comprennent dans un respect mutuel – processus dans lequel l'espéranto peut jouer et joue déjà un rôle unique.

7 - La compréhension est un pas essentiel vers cette réconciliation profonde et durable qui est l'idéal visé par l'Année Internationale de la Réconciliation.

8 - La réconciliation n'est possible que dans une situation où les différences linguistiques ne font pas barrage à un dialogue égalitaire.

9 - En ce sens l'espéranto est, de façon unique, adéquat comme base pour une réconciliation durable, et l'*Association Universelle d'Espéranto*, par l'attention qu'elle porte aussi aux valeurs morales et au respect des droits de l'homme, peut jouer un rôle significatif dans la réalisation des objectifs de l'*Année Internationale de la Réconciliation*.



Jean-Louis TEXIER 1933-2009



C'est en 1947, que Jean-Louis fait connaissance de la langue internationale Espéranto, dans le milieu scout, avec Pol Denis. Lors du *Mondial d'Espéranto* à Paris, en 1950, il organise le premier *Mini-jamborée scout espéranto* à Ablon.

En 1978, Jean-Louis devient membre du bureau de l'*Union Française pour l'Espéranto*, et aide à résoudre avec *Pierre Royer*, *Roger Bernard* et *Roger Despiney* le problème financier pour l'achat du nouveau siège parisien, rue de la "Cerisaie".

Le 31 mars 1979, a lieu le *Congrès Régional Ile-de-France* à CERNY (Essonne). Grâce à son initiative, la Place Zamenhof est inaugurée par M. BOIGNIER maire de Cerny, et une enveloppe 1-er jour philatélique est émise lors d'une exposition salle Delaporte. Jean-Louis fait ainsi découvrir sa commune à de nombreux espérantistes étrangers.

Avec l'aide de Roger Despiney, il permet aussi l'édition par l'*Administration des Monnaies* d'une médaille à l'effigie de L.L.Zamenhof.

Dans les années 1979 à 1985, Jean-Louis devient président de l'*Association Nationale Espéranto*, reçoit le *Trophée Fayne* en 1985, puis de 1986 à 1989, il est membre du bureau de l'*Association Mondiale UEA*.

Coreponsable en 1988, de l'organisation du *Mondial d'Espéranto* à Montpellier, Jean-Louis fait venir le chanteur *Guy Béart* pour présider l'année du centenaire d'*Espéranto-France*.

Jean-Louis est aussi co-auteur du *Grand dictionnaire français-espéranto* et co-organisateur de divers événements comme *Expolangues*, *Salon du Livre*, *Congrès Européen* à Montrouge.

De 2001 à 2004, il devient sous le pseudonyme de *Nicolas II*, le rédacteur d'*Okazas*, petite publication d'informations concernant les activités nationales des espérantistes.

Visiteur fidèle à titre personnel d'une quarantaine de congrès universels d'espéranto, il organise avec succès plusieurs voyages en groupe vers les pays accueillant chaque année le Mondial d'Espéranto.

Dernièrement, c'est aussi chaleureusement que Jean-Louis a soutenu mes démarches auprès de la mairie de *Choisy-le-Roi* pour que le nom de Lazare Louis Zamenhof, initiateur de l'Espéranto, soit donné à une place importante de la commune.

Sa dernière œuvre restera la création avec *Renée Triolle* de "*l'Espéranto de Poche*", publié par la maison d'édition *Assimil*, en avril 2009.

Toute sa vie, Jean-Louis s'est engagé pour promouvoir l'Espéranto, informer, recruter de nouvelles personnes et les intéresser au mouvement espérantiste. Même s'il n'a pas toujours été compris des nouvelles générations, Jean-Louis, toujours soutenu par son épouse Ginette, a su garder autour de lui un noyau d'amis, qu'il avait plaisir à réunir plusieurs fois par an pour un repas amical, suivi d'une visite guidée de Paris, soigneusement, longuement préparée et commentée en espéranto.

Jean-Louis, je me fais le porte-parole de tous tes amis présents ou de cœur avec nous en cet instant, nous sommes conscients que nous te devons beaucoup,

Sois-en vivement remercié.

Sylviane LAFARGUE

(hommage rendu à Jean-Louis, le 10 juillet, lors de la cérémonie funèbre en l'église St-Pierre St-Paul de CERNY)

Memore al Jean-Louis TEXIER

Post longa malsano kuraĝe kontraŭbatalita forpasis Jean-Louis TEXIER, longtempa prezidanto de UFE, kiun li mem alinomigis je la nuna ESPERANTO France.

Permesu al mi omaĝi Jean-Louis, kun kiu mi havis la honoron kaj la plezuron kunlabori dum multaj jaroj . Certe, ankaŭ inter vi, kelkaj memoras iaman viziton lian dum sia esperantista vivo. Li estis komerca direktoro de firmao, kies sidejo troviĝis en suda Francio, sed li traveturis profesie nian tutan landon. Tage li laboris por sia firmao, vespere li okupiĝis pri Esperanto kaj profitis siajn multnombrajn vojaĝojn por kontakti la diversregionajn esperantistojn.

Dank'al tiuj personaj kontaktoj li rekrutis siajn kunlaborantojn kaj ellaboris kun ili la « politikon » de UFE/ESPERANTO-France.

Mi ege ŝatis lian dinamikon kaj efikecon. Ne ĉiuj, komence, aprecis liajn iom « rektajn » metodojn, kiuj revoluciigis rutinojn, sed ĉu ne kun li ESPERANTO-FRANCE gajnis la de UEA aljuĝitan Trofeon FAJNE, unue en 1985 ?

La ŝlosilo de liaj sukcesoj : konstanta efika laborado kaj laborigo de vasta skipo. Certe ĉiuj partoprenintoj de naciaj kongresoj plumemoros pri lia malamo de la vorto « oni » ! Jesja, neniam mankis dum ĝeneralaj kunvenoj intervenoj kiaj : oni devus fari tion aŭ tion ĉi ! Tiam Jean-Louis kutimis diri : kiu estas tiu « oni » ? Ĉu vi pretus fari tiun laboron ? Rezulte malpliĝis la kritikoj ! Sed tre ofte lia insistado poste emigis multajn al agado.

Jean-Louis nun pace ripozu ! Ripozo meritita post senĉesa klopodado en la promociado de nia kara internacia lingvo.

Edmond LUDWIG

Chantal HAREN

Nia samideanino **Chantal HAREN** forpasis subite la 12-an de julio, du jarojn post sia emeritiĝo.

Responsulino de la klubo de *Chalons-en-Champagne*, Chantal multfacete aktivis cele promocii la internacia lingvo -ŝi estis preparanta novan inform-ekspozicion en la urbo- kaj daŭre helpis dum la regionaj esperanto-eventoj. Cetere ŝi ankaŭ gastigis en diversaj renkontiĝoj, eĉ eksterlande.

Ŝia solidareco esprimiĝis ankaŭ tra membriĝo en la asocio de "organ-donacantoj". Kremaciita ceremonio okazis la 18-an de julio.

Sincerajn kondolencojn al ŝia familio kaj amikaro.

Ĝenerala kunveno de Esperanto France-Est la 26an de Aprilo 2009 en Bertrichamps (88)

La kunveno komenciĝis je la 10a.

Mireille ANTONI-TURCK
Liliane BERSWEILLER
Pol DENIS
André GROSSMANN
Jacques HERLE

Robert KUENY
Edmond LUDWIG
Frédéric PORRETTI
Gilbert STAMMBACH
Jean-Luc THIBIAS

En tute : 10 partoprenantoj + 23 voĉrajtigiloj. Koran dankon al la sendintoj.

Raporto

1) Prezento de la financa raporto por 2008 kaj de la buĝeto 2009

André Grossmann prezentadis la financon raporton de 2008 kaj la budĝeton de 2009.

La profito de 2008 atingas 150,13 € kaj la malprofito de la budĝeto 2009 anoncas 505 €.

La malprofito de « Informilo » estas de 591,01 € pro la altigo de sendelspezo kaj pro la manko de abonantoj.

« LA INFORMILO » estas la grava ilo de komunikado de *Esperanto-France-Est*.

Tri ideoj por malpliigi ties elspezojn :

- persekuti insiste cele al abono de la klubmembroj neabonitaj ;
- peti donacojn por ĝin subteni ;
- limigi la nombron de paĝoj.

Jean-Luc Thibias prezentadis la financon raporton de la Libroservo. La profito estas de 65,06€. Li deziras sendi al Afriko kelkajn ekzemplerojn de « Avo-Fungo », ĉar ni posedas ankoraŭ grandan stokon. Roberto Kueny malkonsilis lin pri la ideo, ĉar li sendis al Togolando okulvitrojn antaŭ 3 monatoj : liaj amikoj ankoraŭ ne ricevis ilin. La sendado krome multekostas.

Jean-Luc kontaktos Philippe Chavignon por doni stokon mane al mane.

Voĉdonado : la financaj raportoj kaj la buĝeto estas unuanime aprobitaj :

2) Agadraporto de la federacio por 2008 :

- Printempa staĝo de Vigy en Majo ;
- Europa semajno de Nancy en Majo ;
- Fontenoy la Joute : budo pri Esperanto : trifoje dum la somero
- Pikniko kaj migrado de Ginette Martin, la 31an de Aŭgusto ;
- Aŭtuna staĝo en Ludwigsburg (Germanio) en oktobro ;
- **libroservo** : prezentita en la staĝo de Vigy ;
- **Informilo** : la bulteno aperas kvarfoje jare ;
- PKK : nenio nova;
- Nova retejo de *Esperanto-France-Est* kreita de André Grossmann (granda kaj grava afero).

Voĉdonado : la agadraporto estas unuanime adoptita

3) Projektoj por la jaro 2009 :

- Printempa staĝo de Landersen en Marto ;
- Aŭtuma staĝo en Palatinato en Oktobro (ankoraŭ nekonota loko)
- **libroservo** :
- **Informilo** : la bulteno ree aperos kvar-foje jare
- Printempa staĝo 2010 verŝajne en Nancy.

4) Decido :

Cyrille Hurstel daŭre estas la delegito de *Esperanto-France-Est* ĉe *Esperanto-France*

5) Reelekto de la komitato

Laŭ la statuto ĉiuj komitatanoj rajtas komitatumi dum 3 jaroj. Ĉijare 5 el ili estis reelekteblaj. Ĉiuj rekandidatiĝis, krom Marie-Claude BORREGGIO, kiu demisiis . Temas pri :

- Cyrille HURSTEL
- Edmond LUDWIG
- Ginette MARTIN
- Frédéric PORRETTI

Sin proponis por mandato ĝis 2012 : Mireille ANTONI-TURCK

Ĉar neniu petis sekretan voĉdonadon, la voĉdonado okazis per levo de mano : la novaj komitatanoj estas unuanime elektitaj aŭ reelektitaj :

... ĝis 2012 :

- Mireille ANTONI-TURCK
- Cyrille HURSTEL
- Edmond LUDWIG
- Ginette MARTIN
- Frédéric PORRETTI

6) Ŝanĝo de la estraro

Gilbert STAMMBACH ne plu deziris esti prezidanto kaj ekplenumis la renovigon de la estraro.

Post kandidatalvoko, la sekva nova estraro estis proponita, kaj post voĉdono unuanime adoptita de la membroj.

Edmond LUDWIG	Prezidanto kaj PKK
Jacques HERLE	Sekretario
Robert KUENY	Vic-sekretario
André GROSSMANN	Kasisto
Pol DENIS	Redaktoro de « La Informilo »
Jean-Luc THIBIAS	Libro-servo
Cyrille HURSTEL	Federacia delegito ĉe Esperanto-France

La ĝenerala kunveno finiĝis je la 15a.

Jacques HERLE
Sekretario



Festeno finkursa de **MULHOUSE** **ESPERANTO**

La 26-an de julio, vico da aŭtoj direktis sin al la vilaĝo Battenheim en la proksimeco de Mulhouse. Akceptis nin unue en la ĝardeno, kaj poste en sia domo, Sinjorino Simone Kiry, la tre aktiva anino de la klubo de Mulhouse ! Jam vi legis ŝian nomon sur la bulteno de EDE okaze de la eŭropaj balotoj.



En apuda ejo jam laboris la ĉi-vespera kuiristo, kun kiu ni konatiĝis : Georges Grossmann, la simpatia frato de nia aktivulo André, kiu preparis enorman paelon en grandega pato !

Malĝojo regis ĉe la komenco de la renkonto, kiam André anoncis al ni la forpason de Sinjorino Hélène Damotte. Ŝi iĝis 94-jara, sed



Georges nia kuiristo

suferis pro longa malsano. Neniu forgesis ŝian afablecon kaj helpemon. Ŝi ja kelktempe gastigis la mulhouse-an grupon en sia hejmo, antaŭ ol instigi la membrojn krei oficialan asocion.

Post la aperitivo kaj freŝiĝo de la ekstera temperaturo, la tuta



Bele ornamita festotablo

Roberto surpriziĝas

grupo eniris la domon, kie atendis ilin belege aranĝitan tablon. Tie deĵoris Simone Kiry kaj Masako Grossmann. Kaj ek al la frandado de la paelo, kaj poste de plurplada deserto, eĉ alvenis kuko kun la surskribo ESPERANTO ! Kiaj dolĉaĵoj !

La bonegaj manĝaĵoj eĉ sukcesis silentigi tiun aron de babilemuloj ! Vi ja scias, ke renkontiĝantaj geesperantistoj ĉefe renkontiĝas por ... babilu !

Inter la babilanta dekkvino neces menciigi novan lernanton de André Grossmann, sinjoro Jacques Pineda, kiu post nur kelkaj monatoj da lernado tre vigle partoprenis la diskutojn en Esperanto. Gratulon al li kaj dankon al ĉiuj kontribuintoj pro ties sindonemo.



Edmond Ludwig

94-a UK 2009 en BJALISTOKO

Pli ol 1800 kongresanoj el 63 landoj ĝuis vere eksterordinaran kaj elstaran kongreson en la naskiĝurbo de L.L. Zamenhof en Bjalistoko. Ĝi estis elektita por omaĝi la 150-an naskiĝjubileon de la kreinto de Esperanto. Bjalistokanoj fieras pro tiu grava personeco. La tuta urbo eksciis pri nia evento. Stratoj estis ornamitaj per E-flagoj kaj pluraj afiŝoj ne povis esti ne rimarkitaj. Ankaŭ la urbanoj povis ĝui kelkajn E-aranĝojn okazantaj en la urbo kaj koncerton de Jomo kaj Kimmo en la parko. La etoso kaj entuziasmo en la kongresejo estis grandega malgraŭ



Jam sabate posttagmeze pola folkloro ensemblo plezurigis la ĉeestantojn per siaj kantoj kaj dancoj.



Bjalistokaj artistoj agrable kaptis la atenton de la publiko per siaj kantoj en Esperanto. Plurfoje ili surscenejiĝis, ankaŭ dum la paŭzo de la malferma ceremonio.

kelkaj incidentoj fare de iuj vandaloj. La konstruaĵoj de la Politekniko de Bjalistoko funkciis kiel kongresejo. Apude estis konstruita grandega tendo ekipita per ekranoj. Tie okazis la plej gravaj solenaĵoj kaj eventoj dum la kongresa semajno.

La inaŭguran ceremonion ĉeestis diversaj politikaj kaj urbaj aŭtoritatuloj kaj la partoprenantojn bonvenigis ankaŭ la nepo de nia Majstro. Dum la paŭzo intervenis trupo da talentaj gejunuloj kantante gajajn, melodiajn kantojn. Reprezentantoj de ĉiuj nacioj bondeziris al la kongresanoj en ilia koncerna lingvo "Pacon al vi".

La Movada Foiro ĉiam pligrandiĝas kaj la asocioj sukcese prezentas al la publiko siajn agadojn kaj planojn por la estonteco. La programo estis riĉega, ĉiu devis elekti laŭ sia intereso kaj povis ĉeesti nur parton de la abunda oferto. Grandan intereson de la partoprenantoj vekis la kleriga lundo dum kiu estis pritraktitaj interesaj temoj. Fakaj asocioj havis siajn kunvenojn, estis diskutata la ĉeftemo de la kongreso: "Krei pacan ponton inter la popoloj",



La salono Zamenhof, kie okazis la plej gravaj kunvenoj, estis fakte granda tendo, kiu ja povis akcepti ĉiujn kongresanojn.

Jen la podio dum la malferma ceremonio. Ĝin prezidis la prezidanto de UEA s-ro Probal Dasgupto.



Ĉu nur kongresanoj?
Ne, ankaŭ IF-anoj en Bjalistoko.



Post la solena malfermo estis proponita fari kumunan
foton. Kiel tio eblas kun tiom da homoj, ĉar tie ne estis
taŭga impona ŝtuparo??

Jen sufiĉas uzi la fajro-brigadan eskalon por
povi ĉiujn samtempe foti.

la estraro kaj la Centra Oficejo respondadis de-
mandojn de la publiko, estis prezentitaj filmoj,
pola lingvo eksprese, prelegoj pri Pollando, oka-
zis lingvaj kursoj kaj la Internaciaj Ekzamenoj.
Vespere ni povis
observi per teleskopo stelojn. Ne mankis la ŝatata aŭkcio jam tradicie
kaj sprite goidata de Humphrey Tonkin kaj aliaj interesaj prelegoj.
Ankaŭ la gejunuloj invitis nin al sia programo. La tuttagaj ekskursoj
celis konatiĝon de diversaj regionoj de Pollando.

Vespere ni povis



La Kongresa kuriero aperadis ĝus-
tatempe kun diversaj novaĵoj rilate la
kongreson kaj ekde la dua numero aperadis
regule intervjuoj de konataj esperan-
tistoj pri prognozo de evoluo de Esperanto
ĝis post 50 jaroj. Perfekte funkciis poŝto
kun speciala porokaza stampo kaj la poŝ-
taĵoj estis liveritaj per speciala trajno aŭ
balono kun aldona stampo.

Paralele okazis muzika festivalo de
kulturoj en la urba placo.



La nacia vespero okazis dimanĉe vespere kaj estis
ege riĉa je kulturaj programeroj.

Jen parto el la publiko.





Bankedo kun Liba kaj Floreal



Teatraĵo dum la nacia vespero

Dum la semajno spektblis multaj artaj programoj. Iuj estis dediĉitaj al la juda kulturo. Tre impresa kaj bunta estis la Nacia Vespero. Al la publiko estis amplekse prezentataj muzikaj kaj dancaj tradicioj de Pollando el diversaj tempoperiodoj. Ankaŭ la bankedo, al kiu ni ĉi-jare aliĝis por festi nian 30-jaran geedziĝon la 27-an de julio, estis bonega kaj festena.

Ĉi-foje la plej malmulte kostaj loĝejoj en studentaj ĉambroj situis plej proksime (vid-al-vide) de la kongresejo, kio kontentigis la plejmulton de la partoprenantaro.

En la urbocentro okazis pluraj E-aranĝoj en la kafejo Fama, teatraĵoj en urbaj teatroj kaj multaj el ni vizitis la kafejon Esperanto. Urbocentre troviĝas turismaj informtabuloj pri lokoj ligitaj al la historio de Esperanto, ĉefe al la Majstro kaj la Esperanto-Centro ofertas ekspozicion pri la vivo de Zamenhof.

Resume, pri la ĉi-jara UK ne eblas paroli alimaniere ol per superlativoj. Dank' al la lokaj aŭtoritatuloj, LKK-anoj kaj multaj helpantoj ni povis ĝui modelan kongreson. Dum la tuta semajno regis entuziasmo, festa etoso kaj amikaj renkontoj. Malfacilis forlasi tiun belan lokon.

Espereble la tri kubanoj partoprenintaj la ĉi-jaran kongreson inspiriĝis kaj provos aranĝi venontjare same grandiozan kongreson en Havano. Ili promesis tion...



La domo de Ludoviko Zamenhof kun surmuraj pentraĵoj.

Koncerto sur la ĉefa placo en Bjalistoko por la kongresanoj kaj la ekstera publiko kun plej multaj kantoj en Esperanto.



Raportas Liba GABALDA

Fotoj de Andreo kaj Liba

Postkongreso tra Pollando

Apenaŭ la kongreso en Bjalistoko estis oficiale fermita, jam je la 13a posttagmeze de la unua de aŭgusto pretis la aŭtobusoj por la postkongresaj ekskursoj.


La celo de nia postkongreso kun pli ol 50 partoprenantoj estis la ĉefurbo de Pollando, Varsovio, Krakovo pli sude, Auschwitz, la nazia koncentrejo, Wielicka, salminejo kaj Czestochova, fama pilgrimejo.

En la sama vespero ni atingis Varsovion kaj povis jam viziti kelkajn historiajn partojn de la urbo. Varsovio vere multe suferis dum la dua mondmilito kaj estis detruita je 80%, tial eblas vidi tra la urbo multajn restaĵojn pri tiu terura periodo. Aliflanke poloj sukcesis rekonstrui la malnovan urbo-parton samstile kvazaŭ nenio estis detruita, ĉu frenezaĵo aŭ patriotismo? Certe nuntempe oni prave admiras tian obstinecon.

Ie eblis vidi la spuron de la muro, kiu ĉirkaŭis la judan getton. La reĝa palaco estas mirinde rekonstruita. Entute Varsovio estas nun moderna urbo, certe kun multaj simboloj pri ĝia suferiga historio.




Varsovio: la malnova urbo, komplete detruita dum la dua mondmilito kaj rekonstruita poste.



Jen sur la trotuaro, tiuj surskriboj memorigas la muron de la Varsovio juda getto.

Ni supreniris altan konstruaĵon kaj povis admiri la panoramon de la urbo kun multaj modernaj kvartaloj.



Sur iu placo tiu virino mane kunkudras grandegajn ŝtofojn. La artisto deziris simbolo montri per tio, ke malgraŭ ĉio, eblas rekuniĝi, repaciĝi, kvankam la vojo povas esti ege longa.

Monumentoj rememore al la suferoj kaj poste ribelo de la pola popolo kontraŭ la nazioj. Eĉ infanoj devis iel partopreni.



En la reĝa palaco unu el plafonaj pentraĵoj belege refarita





Kelkaj partoprenantoj de la post-kongreso ĉe la Zamenhofa strato.



En Varsovio ni ankaŭ vizitis la straton L. Zamenhofa, kie troviĝas tabulo pri la domo, kie Zamenhof vivis kaj laboris en la jaroj 1898 ĝis 1915.



En la juda tombejo de Varsovio troviĝas ankaŭ la tombo de Zamenhof. Nia grupo ĝin vizitis kaj multe fotis. Sur la tombo-ŝtono estas skribita:

Doktoro Lazaro Ludoviko Zamenhof kreinto de Esperanto. Kaj malsupre verda stelo.



Flanka surskribo

Antaŭ ol forlasi Varsovion kaj plu-veturi al Krakovo, ni ankoraŭ vizitis la parkon de fama pola komponisto Chopin. Tie ĉiu-dimanche posttagmeze okazas sub ĉiela senpaga koncerto por la publiko, kiu ja vere abundis en tiu tago. Ni povis ĝui la muzikon kaj admiri la iom misteran statuon, kiu montras grandegan manon iom skeleta super la kapo de la komponisto.

Sed la tempo pasis kaj ja necesis forveturi por atingi nian hotelon en Krakovo, kie ni alvenis iom malfrue post la 22a horo.





Jen Krakovo, maldekstre la baziliko Sankta Maria de Krakovo.

Apude la granda bazaro-placo kaj ĉirkaŭe multaj vendejoj, kafejoj kaj restoracioj.

Krakovo estas tre ĉarma urbo, kompare kun Varsovio, ĝi ne estis detruita dum la dua mondmilito, sed 90% de la juda loĝantaro estis murditaj en la naziaj koncentrejoj.

En Krakovo ni restis 3 noktojn en la sama hotelo. La unuan tagon ni vizitis la faman palacon Vavelo, la ĉef-placon, la preĝejon Sankta Maria. En postaj tagoj ni veturis al la fifama nazia koncentrejo Aŭŝvico (Auschwitz). En Wieliczka ni vizitis faman sal-minejon, kiu de 2003 ne plu estas ekspluatita, sed transformita al vasta muzeo, kun imponaj salonoj por koncertoj, eĉ kapeloj, trinkejoj. Plurloke aperas belaj skulptaĵoj el ŝtalo. En la lasta tago jam survoje al Varsovio, nia lasta vizito estis al fama pilgrim-loko Czestochowa. Tie en la katedralo troviĝas la fama nigra madono.



Apud la rivero Vistulo, sur la monto Vavelo je 228 m. da alteco troviĝas la reĝa palaco de Vavelo. Ĝi estis reĝa rezidejo ĝis la fino de la 17-a jarcento. La konstruaĵo havas specialan signifon en la pola historio kaj kulturo. La fundamentoj de la kvarangula palaco datas de la 14-a jarcento. En la palaco troviĝas 71 salonoj, en kiuj naciaj artaĵoj estas konservataj. Specialaj arto-trezoroj estas la kolekto de flandraj tapiŝoj.



Ni vizitis la nazian koncentrejon Aŭŝvico (Auschwitz), kie la nazioj amas-mortigis milionojn da poloj kaj judoj, el plej diversaj lokoj en Eŭropo.

Ni ne rajtis foti la internon de la konstruaĵoj, kie eblis vidi en kiaj kondiĉoj troviĝis la malliberuloj, amason da lasitaj aĵoj de la murditoj kaj eĉ eltranĉitajn virinajn harojn.

Kun ni estis ankaŭ Josefo el Israelo, tial la vizito al tiu loko estis aparte emociiga por li kaj ankaŭ por la ceteraj partoprenantoj, ĉefe kiam li deponis kandelon ĉe la muro de mortpafado.



Czestochowa estas tre fama pilgrimejo. Multaj turistoj kaj pilgrimantoj vizitas ĝin. Ĝi ankaŭ estis nia lasta vizito antaŭ ol reveni al Varsovio.



Nina Pietuchowska estis nia gvidantino dum la tuta postkongreso. Ŝi tre sperte tradukis al ni la klarigojn de la diversaj turismaj ĉiĉeronoj. Ĉiuj postkongresanoj kore dankis ŝin.



Liberec, ĉe la junul-kongresejo...

Ni decidis dormi en amas-ĉambro, sur planko, por esti pli bone mergitaj en junular-bano !

Kia bona akceptado! La deĵorantino en ĉambreto ne povas tuj kontroli niajn aliĝilojn, sed jam proponas al ni sidiĝi sur liton, proksime de ŝi, por ke la atendado estu pli agrabla. Ni jam povas diskuti kun aliaj atendantoj en familia komforta etoso. Post la fino de kontroloj, ni elektas lokon sur planko de amas-ĉambro kiel jam aludite. Nian lokon ni elektas sen koni la najbarojn ĉar, je nia alveno, la jam instalitaj dormo-sakoj estas sen okupantoj... Ni konstato baldaŭ, ke ĉiu el ni ambaŭ dormos inter du junaj viroj, kiuj cetere tute ne ĝenos nin dum la tranoktoj !...

Sed jen la momento de la vespermanĝo.

La unuan tagon, ni enlitiĝas frue, sed la sekvajn tagojn, ni komplete profitas la specialan vivon de la IJK. Unue mi devas diri, ke ĉio estis bonege organizita. Dokumentojn ni ricevis kiel en la UK, la tempo-planado estis afiŝita en la komuna salono, kie ĉiuj pasis, krome ĝi estis konsultebla en ĉiuj etaĝoj de la naŭ- etaĝa domo -kun liftoj- kaj eĉ afiŝita en ĉiu el ili ! Kiam okazas ŝanĝiĝo en la programo, jen tuj la informo je ĉiuj etaĝoj de la tuta domo... la junuloj ŝatas ja afiŝi kaj ili pravas, ĉio pli bone ruliĝas, ili estas tre rapidaj en la informado.

Fakte, tiuj junuloj estas reagemaj pri ĉio. Ili kondukas samtempe eksterordinare kvietaj kaj samtempe rapide efikaj; mi baldaŭ konstato, ke ili estas diversaj. Kelkaj vivas ĉefe nokte, multe festas, dancas, kantas, trinkas ĝis frenezo, kaj atingas sian liton nur matene post elĉerpiĝo ! Aliaj estas pli kvietaj, temas pri la organizantoj. Ili ĉefe vivas tage, multe serioze diskutas, ili estas la cerboj de la afero, sen kiuj nenio povus sukcesi. Multaj kapablas plene vivi kaj nokte kaj tage, kvazaŭ homoj el mirakla speciala raso, ili vere tre impresis min.

Kion diri pri la ĝenerala aranĝo ? Oni tiom multe ridas, diskutas, prelegas, turismas, festas, kiom dum la UK, kun diferenco tamen. la specifa energio de tiuj gejunuloj. Kiel do ili trovas tiun frenezan energion, kiu ŝajnas ne-elĉerpebla ? Jen vulkanoj, kiuj travivas ĉion en torento de entuziasmo ! Sed estus tro longe rakonti ĉion...

Kion mi plej ŝatis? Certe, mi ne povos mencii ĉiujn mirindajn momentojn de la evento, ne pro la fakto, ke ili ne estis grandiozaj, sed ĉar mi ne ĉeestis ĉiujn... Mi citu interalie

- la vesperan koncerton de Kim sur la tegmento de la kongres-domo !

- la kulturalan festivalon sur la granda placo de la urbo kaj, fine de ĝi, la freneza unuhora danco de la junularo sub pluvo-torentoj !

- la muzikan dancan spektaklon "la flutisto de Hamelin", vera juvelo... sed ankaŭ la migradon sur monto, la diversajn prelegojn, la lernadon de dancoj, de muzik-instrumentoj, la helpon en informadiko, la trankvilajn matenajn ludojn en la komuna enir-elir-ĉambro !

Finfine, ĉion mi ŝatis... krom la manĝon, nu... ne tro ! Mi aprezis, ke pluraj distraĵoj okazis en la urbo, tio ebligis ja al urbanoj plezure ĉeesti. Sed ankaŭ la UK kiu sekvos, proponos siaflanke multajn enurbajn aranĝojn por la ekstera publiko. Mirigis min la granda nombro da nacioj reprezentitaj, de iu islanda fiŝkaptisto ĝis iu greka viro, estro de vesperlernejo, kiu lernintis esperanton per la reto nur de kelkaj monatoj. Sama miro pri la aĝoj de la enpartoprenantoj, de la 3-jara David ĝis la 75-jara blankhara viro ! Ĉiuj ŝajnis same kontentaj. Laŭ TEJO, ariĝis 330 homoj el 40 nacioj.

Ĉiuj pace kunvivis... Ideala socio, multnacia kaj multrasa, ankaŭ diversaĝa, kun komuna trajto... mense juna ! Helpis al la frateca etoso la koncentriĝo de ĉio en la sama domo


Fine, mi rehejmiĝas kun multaj fotoj de ridantaj vizaĝoj -jen bona varbado por esperanto ĉe la gejunuloj-, kun granda provizo da entuziasmo kaj belaj memoraĵoj en la kapo".

Ginette MARTIN

* Internacia Junulara Kongreso

** (pri la subtitolo kulpas la redaktoro de la bulteno)

Fotis Ginette: Simone kaj junaj kongresanoj !



Une expo pour communiquer avec le monde

Le club d'espéranto de Saint-Dizier présente actuellement une exposition à la MJC. Objectif : présenter la langue internationale et, à court terme, mettre en place des cours destinés aux enfants et aux adultes, au sein de la structure.

J'estime que l'espéranto, dans le respect de la diversité culturelle qui lui est consubstantiel, serait un facteur d'harmonie et de compréhension entre les peuples.» Cette phrase, écrite par le président Chirac en avril 2002, résume à elle seule ce qu'est l'espéranto : une langue universelle qui facilite les rapports entre l'humanité. Hommes politiques, écrivains, scientifiques... Nombre de personnalités ont apporté leur soutien à cette langue, dont 26 Prix Nobel. Mais l'espéranto reste marginale et non officielle.

Une langue facile à apprendre

«Pourtant, on a le vent en poupe en ce moment. Nous avons présenté des listes aux dernières élections européennes (sous la bannière Europe Démocratie Espéranto. Les listes ont obtenu 29 263 voix en France et 11 859 en Allemagne, ndr), souligne Claude Jourde, responsable du club bragard. On ne veut pas forcément faire de la politique, mais

juste se faire connaître et montrer que l'espéranto est utile.»

Pour y parvenir, le club de Saint-Dizier, basé au club Léo-Lagrange, présente une exposition à la MJC. Une série de panneaux présente ainsi les divers avantages de la langue, notamment la facilité d'apprentissage. «Pour parler l'espéranto, il faut compter une cinquantaine d'heures, quand il en faut 1 500 pour l'anglais ou 2 000 pour l'allemand, insiste Claude Jourde. Il n'y a que seize règles fondamentales dans l'espéranto. Une fois qu'on les connaît, on peut parler dans le monde entier.»

Des cours à domicile ?

Une langue simple où tous les noms communs se terminent par «-o», les adjectifs par «-a», les pluriels sont en «-j» (à prononcer comme un «y») et les infinitifs en «-i». Tous les mardis, au club Léo-Lagrange, les bénévoles du club d'espéranto distillent cet apprentissage.

Mais le club veut désormais aller plus loin. «Le but de l'exposition, c'est aussi de mettre en place des cours à la MJC à la rentrée. Ils seront destinés aux adultes et aux enfants, continue Claude Jourde. Par la suite, j'aimerais développer des cours particuliers à domicile. Car certaines personnes n'osent pas venir dans un club par peur de devoir parler devant tout le monde.»

Si on a du mal à estimer le nombre d'espérantophones dans le monde, on peut tout à fait imaginer qu'ils sont nombreux. A tel point que de célèbres bandes dessinées ont été traduites dans la langue universelle.

«Gaston Lagaffe, Tintin ou Astérix ont des éditions en espéranto, conclut Claude Jourde. En tout, ce sont plus de 35 000 livres qui ont été traduits, dont la Bible et le Coran.» Preuve que l'espéranto dépasse les clivages, qu'ils soient politiques ou religieux.

Pierre-Julien Prieur

Le Journal de LA HAUTE-MARNE - vendredi 21 août 2009



Bulteno por E-radioamatoroj, n-ro 75

Internacia Ligo de E-RadioAmatoroj, ILERA regule aperigas sian fakan bultenon. Krom la ceteraj, pormembraĵaj informoj, la ĵus aperinta, freŝa numero (jam la 75-a !) enhavas ankaŭ du interesajn, scienc-popularajn artikolojn, verkitajn de *Lenio Marobin, PY3DF, Brazilo*:

- La suno malvarmiĝas: Kion tio reprezentas por ni ? (artikolo pri sun-makuloj)

- Morsa kodo - historio de kelkaj mallongigoj...

La bultenoj de ILERA en *formato pdf* estas troveblaj ĉe

<http://ilerabulteno.googlepages.com/ilera-bultenoj>

L.S.

fonto: Ret-Info <http://www.eventoj.hu>

Les cyclistes espérantistes sont arrivés en Iran

Paru le jeudi 20 août 2009

Photo : D.R.

Dans le désert ou en ville, Rose et Cyrille ont été très amicalement reçus en Iran.

Rose et Cyrille, ces deux fonctionnaires qui étaient de passage en mars à Saint-Raphaël, continuent leur incroyable tour du monde. On les avait quittés, le 30 mars dernier, devant l'agence de notre journal sur le bord de mer raphaëlois. Rose et Cyrille étaient alors remontés sur leur vélo de 20 kg, chargés de 30 kg de bagages, avaient appuyé sur les pédales et s'étaient retournés pour un ultime au revoir, (*notre édition du 30 mars, page Saint-Raphaël*). Très honnêtement, ceux qui les avaient vus partir ne paraient pas cher sur leur chance de réussir leur pari : boucler un tour du monde à vélo.

Ils sont en train de faire mentir les incrédules, ceux qui doutaient de leur capacité. Car depuis quelques jours, Rose Sanz et Cyrille Pinardon sont arrivés en Iran, peut-être pas au meilleur moment, entre élection présidentielle contestée et manifestations durement réprimées.

« Nous avons rejoint l'Iran peu de temps après l'élection présidentielle et tous nos amis nous déconseillaient d'y aller. Nous avons écrit à des espérantistes à Téhéran pour savoir quelle était la situation réelle. Ils nous ont assuré qu'il n'y avait pas de problèmes. Et, en toute sincérité, nous écrivent Cyrille et Rose, l'Iran est le pays où les gens sont les plus aimables et serviables que nous ayons rencontrés jusqu'à présent. »

Sauvés par l'Espéranto

Bien entendu, les deux cyclotouristes français éprouvent quelques difficultés à communiquer avec leurs hôtes persans. Ne parlant pas le Farsi et mal l'anglais, les conversations sont limitées. Mais Rose et Cyrille ont une technique très éprouvée. Depuis des années, ils sont des adeptes inconditionnels de l'Espéranto, cette langue universelle. Ainsi, en Iran, ils ont rencontré un journaliste espérantiste qui leur a servi de traducteurs et les a guidés. Mais surtout, il leur a consacré un article sur une double page qui a été très lue.

« Car, pratiquement dans tous les pays, nous avons eu la chance d'avoir de bons contacts avec les médias. Les articles de journaux, particulièrement celui rédigé en Farsi nous permet de communiquer avec les populations locales. Ils nous ont servi à nous présenter. Ensuite, le contact est plus facile pour demander des renseignements, du pain, de l'eau ou un hébergement », expliquent les deux baroudeurs.

Direction l'Inde

Par la suite, les intrépides cyclistes désiraient continuer leur route par le Pakistan, car rien ne semble les freiner, même les situations les plus périlleuses. *« Nous n'avons pas réussi à obtenir nos visas pour ce pays, car le consulat demande une lettre de l'ambassade de France, et bien entendu, l'ambassade de France ne fait pas de lettres de recommandation pour ce pays... ! On peut tourner en rond longtemps »,* regrettent-ils.

Qu'importe, ils vont prochainement rejoindre les Émirats Arabes Unis et, de là, gagner l'Inde par bateau. Pour de nouvelles aventures qu'on leur souhaite enrichissantes mais sereines, agrémentées de nombreuses rencontres espérantistes.

Dans quelques semaines, car il n'est pas facile de communiquer avec eux, nous vous donnerons de leurs nouvelles avant leur retour en France et, certainement, un nouveau passage à Saint-Raphaël.

Pour suivre le voyage de Rose et Cyrille, voici leur site : <http://horizonto.free.fr>

M.V.



... de "la Zamenhof-strato" al "la rue Zamenhof"...

aŭ la multfaceta "aventuro" de traduk-entrepreno

(Sekvo. La unuan parton vi malkovru en "La Informilo" 146)

[... / ...]

L'harmattan ĵus telefonis al mi, ke 140 ekzempleroj de la libro "la rue Zamenhof" estas presitaj, sed ke okazis problemoj.

"Kiu problemoj? ...

- Eraro sur la lasta paĝo de la koverto, mankas "n" ĉe la vorto Dobrzynski. Pro tio ni devas nun repreni la 40 ekzemplerojn jam liveritajn ĉe la Cerisaie, por demeti la kovertojn kaj refari novajn kovertojn.

- Ĉu vi ne havas ekzemplerojn sen la eraroj, kaj ĉu vi ne povas interŝanĝi ilin?

- Ne, ĉiuj 140 ekzempleroj havas la eraron.

- Sed kiom da tempo por tiu rekomenco de laboro?

- Unu semajnon...

- Tiu eraro ne estas katastrofo, la vorto Dobrynski estas bone skribita sur la titol-paĝo, kaj ĉiufoje bone en la libro. Se ni akceptas, ke vi ne rekomencu tiun grandan laboron, ĉu ni povus peti kompenso, ke kelkaj pliaj senpagaj libroj estu liverataj al ni?

- Jes..."

Sed poste, kiam mi telefonis al Suzanne por esti certa, ke la libroj estas liveritaj, ŝi informis, ke nenio venis el la presejo, kvankam ŝi deĵoris plentempe la tutan tagon, krom duonon de horo.

Mi do telefonis al l'harmattan, kaj la sama persono, kiu informis min pri la eraroj, estis tre surprizita kaj promesis telefoni tuj al la presejo, por ke la promesitaj libroj estu liverataj hodiaŭ antaŭ la 18a 30.

"Mi konfirmos, kiam la libroj estos reale liverataj ĉe la Cerisaie ...".

Vi konstatas, ke mi anoncas la aperon kaj la baldaŭan liveron de tiu libro la plej frue eble, ĉar Esperanto-France ne rajtos vendi ĝin en la salono de Unesko. La homoj, kiuj deziros akiri ĝin, devos iri ĉe la sidejo de La Cerisaie. Estos deĵorantoj morgaŭ vendrede (pri sabato mi ne demandis) kaj lundon, dum la tuta tago ĝis la 16a30. Aliflanke, eble okazos sovaĝa vendo de libroj ekster la pordoj de Unesko por la personoj, kies trajn-horaroj ne ebligas iri ĉe la Cerisaie, (ĉar en Unesko-salono, ni povos nur vidi la libron, sed ne povos aĉeti ĝin).


.../...

Tiu libro kostas 24,50 eŭrojn. Ĝi prezentas originalan titol-paĝon, kaj fotojn donitajn de Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, kiuj estas unikaĵoj, kaj ne aperis en la aliaj versioj. Krom tio, ĝi estas interesa libro, sur kiuj ŝvitis pli ol deko da bonvoluloj... En alfabeto ordo: Michèle Abada-Simon, Bruno Flochon, Armand Hubert, Godeleine Logez, Claude Longue-Épée, Stano Marček, Ginette Martin, Emmanuelle Richard, Axel Rousseau, Catherine Roux, Renée Triolle, Pascal Vilain, kaj Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof. Donis diversajn helpojn : Jean-louis Texier kaj Claude Nourmont.

.../...

Mi estas tre fiera pri tiu kolektiva laboro. La lastaj anekdotoj estas nur kelkaj pecoj el la spertitaj senĉesaj problemoj, kiun mi renkontis kun la eldonisto... Feliĉe, baldaŭ la bebo povos vivi sian propran vivon. Bonvenigu ĝin!

Ginette Martin



2009 estas la jaro de Charles Darwin. La nuna jaro 2009 estas la 150-jara datreveno de la publikigo de la ĉefverko de Charles Darwin, kaj la 200-a datreveno de la naskiĝo de la aŭtoro.

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko. La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, **La Origino de la Specioj** restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

* Aŭtoro: Karolo Darvino

* Fako: sciencaj verkoj

* Paĝoj: 430

* Pezo: 460 g

* Tradukis el la angla: Klivo Lendon

* Formo: libro kudre bindita

* Formato: 135 x 205 mm

* ISBN: 978-90-77066-40-9

* Ilustris: Julia Litvinova

* Prezo: 24 €

* Eldonjaro: 2009

havebla ĉe nia libro-servo

... kampanjo "TURISMO PER ESPERANTO" ...



La fako, en kiu Esperanto de longe havas praktikan utilon, ja estas turismo.

Iom post iom maturiĝas la ideoj pri kampanjo TURISMO PER ESPERANTO.

Por organizi tiun kampanjon, **mi instigas ĉiujn klubojn kaj unuopulojn de ESPERANTO France-Est, traduki aŭ krei tekston pri la vidindaĵoj de sia regiono. Tiujn tekstojn ni aperigu en la reto, se eblas kun memfaritaj fotoj.**

Tiajn informojn ĉiu turisto esperantlingva vizitanta nian regionon povos konsulti kaj eĉ presi, post aperigo en la reto.

Post la enretigo ankaŭ eblos prepari resumojn voĉe registrotajn por la projekto de Cyrille HURSTEL : disponigi perrete atingeblajn sonprezentojn. (Relegu la klarigojn de Cyrille HURSTEL en LA INFORMILO 146.)

Fine, kiam ĉio pretos, eblos lanĉi kampanjon kaj al la esperantistoj, kaj al la neesperantista publiko, por ke ili ekvidu, ke la Internacia Lingvo ja utilas !

Ĉu vi kunlaboros ? Ĉu vi disponigos al ni vian materialon ? Ankaŭ surpaperaj tekstoj estos akceptataj. Antaŭdankon pro viaj kontribuoj !

Edmond LUDWIG

Ĉu Esperantokurso en la Universitato de Mulhouse ?



Junie 2009 la dekanato de la Fakultato pri Lingvoj kaj Homaj Sciencoj de Mulhouse kontaktis Sinjoron André GROSSMANN kaj anoncis al li, ke li intencas malfermi Esperanto-kurson en sia universitato. Jam plurajn jarojn li proponis al la Esperantogrupo de Mulhouse budon okaze de la tago de malfermaj pordoj.

La dujaran kurson gvidos Edmond LUDWIG, se ... enskribiĝos sufiĉe da studentoj ! Cetere : studentoj de ĉiuj aliaj universitatoj rajtas elekti tiun kurson, eĉ personoj, kiuj ne plu estas studentoj.



La 24an de junio 2009, en Nilvange, la asocio *Espéranto Thionville* organizis ekzamenon de *Franca Esperanto Instituto*.

Kvin el niaj lernantoj trapasis la ekzamenon de la unua grado "**Atesto pri Elementa Lernado**".

Kvar sukcesis: *Maria ROJANO* (Algrange 57), *Véronique COSTEL* (Briey 54), *Pierre SALINGUE* (Saulnes 54) kaj *Raymond MILÉSY* (Thionville 57).

Instruis ilin *Marcel REDON*.

Gratulojn al ĉiuj !

Bruno HENRY




nova atentigo ... !

... uzendaj adresoj pri la retejo de nia asocio *Espéranto France-Est* ...

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

<http://esperanto.france.est.free.fr>



originala promocio esperanton ! . . . foto videbla lastan paĝon

(nia samcelano Michel Masson iniciatis tiun "nekutiman" manieron informi la publikon, kiu "feriis" sur vendea plaĝo)

Tre instrua tago

... Ne ĉio disvolviĝis kiel antaŭvidite : ne eblis instali la tendon pro tro forta vento kaj forestantaj metalaj pecoj. Tial oni perdis en videbleco kaj rimarkebleco. Tamen la aranĝo estis bone videbla ĉe la enirejo de la vojo, kiu kondukas al la plaĝo. Krome, aperis bona anoncartikolo en la samdata numero de **Ouest-France**. Ĉeestis ĵurnalisto de la tag-gazeto, kiu longe, kaj bedaŭrinde vane, atendis. Feliĉe, li estis tiel ŝercema, gaja kaj humurema ke lia ĉeesto agrabligis la tempon. :-)

Marc Pleysier (1) bone alvenis, sed multe pli malfrue ol antaŭvidite, ĉirkaŭ la 17a 10 mn anstataŭ la 15a. Lia kunulino, Bichon, tro laca, haltis en Saint-Michel-en-L'Herm, ĉe Stéphane Robert, kiu akceptis gastigi ilin la sekvantan nokton. Sekve, Stéphane Robert venis al La Faute-sur-Mer per sia kuŝbiciklo kun Marc Pleysier. La vera kontakto kun la publiko, kiun altiris tiuj "strangaj bicikloj", komenciĝis nur post ilia alveno. Do, la malkovro de kuŝbiciklo ebligis la malkovron de staranta Esperanto ! :-)

Stéphane Robert, metiisto-gravuristo en Saint-Michel-en-l'Herm, kies retejo estas dulingva, franca-Esperanto, unuafoje provis tiun biciklon por la irado ĝis La Faute-sur-Mer (ĉ. 8 km). Dank' al bona anonc-artikolo kaj afiŝado pri tiu aranĝo, plurfoje, dumvoje, homoj returne rigardis kaj diris : "*Ils arrivent !*" (Ili alvenas !) kio pruvas ke ili estis informitaj.

Konstatoj

La civitanoj estas larĝe sensciaj pri la ekzisto de Esperanto, kaj la respondeco pri tio estas je la plej supera nivelo de la ŝatoj. La baza civitano papage ripetas nur kliŝojn, onidirojn. Paradoxse, Ĉinio estas unu el la landoj la plej malfermataj al tiu lingvo. Ĉi tie, la homoj, kiuj scias pri kio temas, havas pri ĝi plejofte nur supraĵajn konojn. Tiuj kiuj aŭdis pri ĝi jam de dekoj da jaroj kredas ke ĝi malaperis, dum la Interreto montras ke ĝi bone vivas.

Ekzistas nekredebla nescio de la publiko koncerne la lingvajn demandojn, la problemojn de lingvoj, de lingva maljusteco, kaj, aparte, pri la realeco de Esperanto. Kiam metiisto, dungito, aŭ eĉ kadro aŭ entreprenestro de neangla lingva lando foroferas liberan tempon kaj monon al la angla, la denaskaj anglalingvanoj povas dediĉi la saman sumon da tempo kaj mono al ĉiaspecaj aktivaĵoj riĉigaj en ĉiuj sencoj de la vorto. Tio estas trompoludo.

Konkludo



Necesos trovi aliajn okazojn por rekomenci. *Espéranto-Vendée* jam havas alispecan proponon por la tria semajno de septembro. . . Dankegon al sinjoroj urbestroj de La Faute-sur-Mer kaj de Moutiers-les-Mauxfaits, kaj ankaŭ al la entreprenoj kaj sociaj strukturoj, kiuj alportis sian moralan subtenon !

La listo aperas ĉe

<http://www.ipernity.com/blog/32119/169538>

kun la foto-albumo kaj galerio

<http://www.ipernity.com/doc/32119/album/140672>

kaj <http://www.ipernity.com/doc/32119/album/141271>

Pripensiga materialo

Ekzistas paraleleco inter Esperanto, publikigita en 1887 fare de D-ro Zamenhof, kaj la kuŝbiciklo inventita kaj konstruita fare de Charles Mochet (*ŝarl moŝe*, 1880-1934) : ambaŭ estas ankoraŭ viktimoj de ostracismo. Esperanto ebligas rekordojn de tempo kaj kvalito en interpopola lingva komunikado. La efiko de kuŝbiciklo estas supera al tiu de komuna biciklo. La rekordoj de kuŝbiciklo estis rifuzitaj en 1934 fare de la *Internacia Biciklista Unuiĝo*. La mondrekordo de rapideco sur kuŝbiciklo apartenas al Kanadano : **132, 5 km/h en 2008** sur ebena vojo !

luj regpovoj vidis en Esperanto danĝeran lingvon, kaj aliaj vidas en ĝi, ankoraŭ nuntempe, ĝenan lingvon pri kiu endas prisilenti la ekziston, la aktualecon kaj la aplikaĵojn. Por Esperanto, ekzistas pli ol 546-paĝa libro aperinta en 1988 pri la malhelpoj kaj persekutoj, kiujn

ĝi devis venki en pli ol centjara historio : "La danĝera lingvo".

(1) Marc Pleysier estas unu el la tri asociitoj, kiuj konstruas la kuŝciklon. Konvikita esperantisto, li proponas la retpaĝon de la firmao en du lingvoj ! ... www.aliaciklo.fr

reportaĵo en Esperanto ĉe germana televido

La Informilo 147 – paĝo 22

... Indas rigardi !



Marde la 22-an de julio 2009 en sia noktomeza programo "Nachtmagazin" ("Nokta magazino"), la unua germana televidkanalo ARD elsendis 3-minutan raporton pri la **65-a Internacia Junulara Kongreso** de TEJO, organizata inter la 18-a kaj la 25-a de julio en **Liberec** (Ĉeĥio). Laŭ statistikoj de ARD [1] vidis tiun raporton ĉirkaŭ 560.000 spektantoj.

La raporto elstaras ne nur pro tio, ke preparis ĝin la eksterlanda redakcio de la germana ARD en Ĉeĥio, sed ankaŭ pro la fakto, ke **ĝi estas preskaŭ komplete parolata en Esperanto**, kun subtekstoj en la germana lingvo. Per tiu escepta sindediĉo, la redaktoro *Danko Handrick*, helpita de la kongresanoj *Carsten Mischke* kaj *Gregor Hinker*, celis montri al la spektantoj "vivan esperanton" - kio estas ankaŭ la nomo de tiu raporto.

La raporto spekteblas cxe:

<http://www.youtube.com/watch?v=rwqJITm5xrM>

La nun okazanta 65-a IJK estas la unua sur la teritorio de Ĉeĥ(oslovak)io. Atenton meritas ankaŭ la trilanda kunlaboro de ĈEJ, GEJ kaj PEJ.

Mil. laŭ raporto de Marek Blahuš, ijk@esperanto.cz

Fonto: <http://www.daserste.de/programm/quotendetail.asp>

Résumé


Reportage en espéranto sur une télévision / allemande

Le reporter qui a filmé la *Rencontre Internationale des Jeunes* (Internacia Junulara Renkontiĝo – IJK), à laquelle participent 300 jeunes, du 18 au 25 juillet à **Liberec** (Tchéquie), et la rédaction de la chaîne de télévision allemande ARD, ont fait un travail à la fois original et remarquable en ce que son reportage **a été diffusé presque intégralement en espéranto** avec sous-titrage en allemand.

Pour le rédacteur, Danko Handrick, aidé de participants, il s'agissait de montrer l'espéranto sur le vif. Le résultat, à voir sur <http://www.youtube.com/watch?v=rwqJITm5xrM>, est convaincant.



... Bonan tagon !



Mi ŝatus inviti vin viziti nian novan projekton: **Verda filmejo** (Filmoj en Esperanto) ĉe

<http://filmoj.net>

Afiŝoj, reklamaj filmetoj kaj ekran-printaĵoj de filmoj aŭ origine filmitaj en Esperanto aŭ kun esperantlingvaj subtekstoj aŭ voĉigitaj en la internacia lingvo - ĉio aperados en la retejo foj-foje kun aldonaj interesaj faktoj.

La projekto estas la unua projekto de nova **REJM** (**Rusia Esperantista Junulara Movado**).


Vizitu, komentu, kontribuu kaj nepre ĝuu!

Aleksander Osincev alex.osintsev@gmail.com

fonto: Ret-Info

<http://www.eventoj.hu>

... plus qu'un témoignage, un argumentaire !...



"... J'ai bien aimé votre billet !

A priori, j'étais sceptique face à l'idée d'une langue à la fois plus facile à apprendre, ayant un maximum d'éléments communs aux autres langues et permettant véritablement de s'exprimer.

Il y a un peu plus de 3 ans, je me suis pris au jeu d'essayer de l'apprendre. J'ai suivi 10 cours d'une heure avec une personne qui n'est pas enseignante et qui se contentait de présenter les règles de grammaire et de faire lire et prononcer correctement. Puis, j'ai continué seul avec quelques exercices sur internet et des lectures.

J'ai continué et on ne m'accordera donc plus le privilège de l'objectivité... puisque je suis devenu un pratiquant de la langue en question. Tant pis !

J'ai étudié l'allemand pendant 9 ans et l'anglais pendant 6 ans. Puis j'ai vécu en pays germanophone pendant 3 ans et pratiqué relativement régulièrement l'anglais lors de voyages ou par la lecture de la presse. Eh bien... c'est incroyable, mais **mon niveau d'espéranto après 3 ans et demi écrase mon niveau en allemand et en anglais.** Non seulement, je peux écrire presque sans fautes, m'exprimer oralement avec une certaine aisance et lire n'importe quel livre. D'ailleurs, lorsque je lis en allemand, je comprends l'essentiel, mais je manque toutes sortes de finesses. En espéranto, je suis capable de comprendre chaque phrase et chaque mot !

Avouez que cela peut emporter l'enthousiasme !

Alors, bien sûr, on entend régulièrement les mêmes réticences :

- L'espéranto serait un mélange ignoble et artificiel... mais non, c'est une langue "construite" sur la base des langues européennes en se basant avant tout sur les points communs de ces langues. Un peu comme les allemands des XVIe et XVIIe siècles ont construit le *hochdeutsch* sur les dialectes existants à l'époque.

- L'espéranto serait une langue sans culture : sans culture "nationale", oui en effet. Mais la littérature "originale" de bonne qualité en espéranto existe et je me régale régulièrement de romans magnifiques. Et quel plaisir de s'amuser à discerner sous la langue internationale des subtilités qui trahissent l'origine de l'auteur !

- L'espéranto ne permettrait pas d'exprimer toutes les nuances : voici une idée qu'on ne peut défendre que si on n'a jamais essayé ! Je fais depuis quelques temps l'expérience du contraire. J'ai de la peine à rendre en français des choses lues en espéranto. Vraiment, c'est une langue tellement flexible qu'elle permet au contraire de s'exprimer très aisément et avec beaucoup de nuances.

En somme, l'espéranto est une sorte de jeu : des pièces en quantité limitée, des règles du jeu relativement simples et une combinatoire infinie. Il existe des jeux de société avec un livre de règles épais d'un ou deux centimètres. Mais il y a aussi les échecs dont les règles de base sont très simples mais qui permettent de combiner dans des proportions incroyables. L'espéranto, c'est un peu comme les échecs.

Il y a encore d'autres arguments qui plaident en faveur de l'espéranto :

- Le dialogue se fait grosso modo à égalité (alors que si on dialogue avec un anglais en anglais, on est clairement en situation d'infériorité !)

- Les progrès sont très rapides au début (en un an, on s'exprime presque aussi bien qu'après plusieurs années d'anglais... Un japonais m'a dit que pour lui, c'était entre 5 et 10 fois plus facile !)

- Les ouvrages traduits en espéranto le sont par des traducteurs de la langue source (ainsi, Dostoïevski est traduit par un russe en espéranto, alors que c'est souvent par un francophone en français).

Alors, la "question qui tue" fuse : mais, si c'est si bien, pourquoi cela reste-t-il donc si marginal ?

... Bonne question !

Le mouvement espérantiste est resté œuvre d'amateur et fait souvent preuve de beaucoup d'amateurisme, sauf peut-être au niveau "mondial". Les moyens financiers font défaut. Cette langue est mal perçue au départ et peine à dépasser les préjugés négatifs. Elle est perçue comme inutile.

Tout cela est vrai... et c'est dommage tant l'objet est étonnant. Je ne peux que conseiller à ceux qui aiment les langues de s'y essayer : c'est extrêmement ludique et fascinant. Quant à ceux qui ont des préjugés, qu'ils essaient pour infirmer ou confirmer leurs préjugés. C'était aussi mon cas...

En plus, ce n'est vraiment pas "inutile". Bien sûr, on ne peut pas débarquer dans un aéroport et parler à n'importe qui comme on le ferait avec l'anglais. Par contre, il existe des espérantophones dans plus de 100 pays, avec un réseau d'accueil chez l'habitant, ce qui permet des discussions passionnantes... justement parce que le niveau de l'échange sera très souvent plus élevé qu'en anglais... [.../...]".

Premion *Deguĉi* en 2009 ricevis "Vinilkosmo" !!

En la kadro de la fermo de la UK en Białystok, la eldonejo *Vinilkosmo* ricevis la Premion *Onisaburo Deguĉi 2009*, ankaŭ nomata "esperantista pacpremio", ĉar ĝin oni donas pro agado, kiu antaŭenigas internacian amikecon kaj pacon. *Vinilkosmo* kontribuas al tio per muzikaj rimedoj... tiel rezonis la estraro de UEA.

La premio konsistas el diplomo, kiun transprenis en Białystok *Jeanne-Marie Cash* por transdoni al la respondeculo de *Vinilkosmo* kaj *Eurokka* en *Donneville* (*Toulouse* / suda Francio / Okcitanio). Krome, la premio konsistas el la sumo de 2000 eŭroj, kiujn *Vinilkosmo* dediĉos al financo de nova projekto de albumo de esperantista artisto kaj, tra *Eurokka*, al financo de esperanta artista programado, kadre de turneo aŭ de kultura aranĝo kaj festivalo en la venontaj monatoj.

La tuta teamo de *Vinilkosmo/Eurokka* dankegas la UEA-estraron pro la atribuo de la premio kaj akceptas kun granda plezuro kaj honoro tiun premion, kiel agnosko al la 21-jara

Esperanta muzika agado, kiu strebas kontribui al paco kaj interkompreniĝo en la mondo, per Esperanta muzika kulturo.

Fotoj videblas en la blogo ĉe <http://vinilkosmo.ipernity.com>

Floreal Martorell (Flo)

respondeculo de *Vinilkosmo* kaj de *Eurokka*

<http://www.vinilkosmo.com>

... muziko, grava ero de la esperanto-kulturo ...

iomete da statistikoj

Saluton!



Dum la pasintaj 40 jaroj eldoniĝis almenaŭ **270 muzikalbumoj kun Esperanto-kantado**. La statistiko montras daŭran kreskon... En la sesdekaj jaroj aperis ĉ. 4 albumoj, en la sepdekaj ĉ. 17, en la okdekaj ĉ. 58, en la naŭdekaj ĉ. 75 kaj en la unua jardeko de la 21-a jarcento ĝis proksimume decembro 2007 ĉ. 105 (dum 8 jaroj). Alimaniere dirite, ekde 1977 ĉiujare eldoniĝis almenaŭ unu albumo, ekde 1987 almenaŭ kvar jare, ekde 1996 almenaŭ ok.

La maksimumon oni atingis **en la jaro 2001**, kiam aperis escepte multaj, nome **27 albumoj**. Laŭ la kvanto sekvas 2004 kun 16 albumoj kaj 2000 kun 14. Ekde tiam okazis ioma malkresko al ĉ. 8 albumoj jare - plej verŝajne tio estis sekvo de la pli vasta uzado de

mp3-formataj dosieroj.

La eldonado bele montras la kreskon de Esperantujo dum tiuj jardekoj – jardekoj, kun pli kaj pli grandaj kaj multaj junularaj kaj eksjunularaj renkontiĝoj, kun pli da denaskuloj kaj aranĝoj por ili, pli da Esperanto-aktivado en ekstereŭropo, pli da scienca literaturo kaj, en la pasintaj jaroj, bela prezentiĝo de Esperanto en la interreto.

La liston de tiuj preskaŭ **300 muzikalbumoj** mi metis al *wikipedia*, ĉe

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-muzikalbumoj>

aliaj korektis kaj aldonis. Ĉe kelkaj titoloj plu mankas iuj indikoj, aliaj titoloj eble entute mankas. La vikipedio kaj ĉiu uzanto ĝojos pri via aldono.

Lu Wunsch-Rolshoven lu.esperanto@gmx.de
el [esper-inform]

Ndlr: *Laŭteme ligita retejo* estas la kolekto de tekstoj kaj muziknotoj de Esperantaj kantoj, trovebla ĉe:
<http://ikso.net/kantaro/> - L.S.

fonto: Ret-Info



La HHK (HipHopa Kompilo), libere elŝultebblas nun !!!

Finfine la hiphopa kompilo (HHK) aperis, sed en paralela libera projekto ekster Vinilkosmo, fare de kolektivo de hiphopaj artistoj sub la gvido de DJ Roĝer kaj Platano.

Ĝi enhavas hiphopajn / repajn artistojn de *Eterne Rima* ĝis *Tone* kaj *la Pafklik* kiel plej famaj repuloj sed ankaŭ estas aliaj malkovrindaj !

La HHK aŭskultebblas kaj haveblas ĉe HIPHOPA KOMPILO en *Ipernity* :

<http://www.ipernity.com/doc/rogerborges/album/141687>

Ankaŭ eblas elŝuti la tutan kompilon el unu sola ZIP-dosiero ĉe :

<http://hiphopesperanto.blogspot.com/>

Albumo de *La Pafklik* elŝuteblas en la MP3-servo de Vinilkosmo :

http://www.vinilkosmo-mp3.com/index.php?cPath=74_99_81&language=eo

... neelĉerpeblaj "Ŝvarcaĵoj" ! ...



Kiel ĉiuj scias, Raymond Schwartz estis tre sprita homo kaj ofte faris vortludojn. Kelkaj el ili estas konataj, ĉar oni legas ilin en verkoj de tiu aŭtoro. Sed mi mem, kiel amiko lia, havis okazon ĉeesti la "naskiĝon" de neeldonita Ŝvarcaĵo.

Iun vesperon en Parizo, post iu prezento en la kabaredo "Ĉe la tri koboldoj", en kiu li ĉefrolis, ni iris, kelkaj spektintoj kaj Schwartz, al metroa stacio por reveturi hejmen. Sed li devis veturi al alia direkto ol ni, do atendis sian trajnon sur la kontraŭa perono, ol la nia.


Kiam neniuj trajnoj estas en la stacio, tre facilas paroli al tiuj, kiuj staras kontraŭe. Ĉe la muroj estis reklamoj, kaj Raymond alparolis nin tiel, ekde sia perono... *Ĉu vi volas savi monon ?* Necesas scii, ke li estis profesie bankisto. Tial tiu demando lia kredigis al ni, ke temas pri financa konsilo de specialisto. Kaj sen atendi respondon de ni, li montris reklaman tabulon kun la vorto MONSAVON, dirante: *Ĉi tie vi havas monsavon !*

Fakte la tabulo neniel rilatis al financo, sed al ŝapo, kaj tiu marko signifas en la franca lingvo *mia ŝapo (mon savon)*. Ni do ne povis savi monon, sed tutkore ridis pri la ŝerco de nia sprita kanzonisto !

Kaj alvenis trajnoj, kiuj portis lin kaj nin laŭ malsamaj direktoj.

Daniel LUEZ

rezultoj EDE



En 2009, *Europe Démocratie Espéranto* (scrutin en France) est en 16ème position parmi 39 listes avec **29 263** voix (0, 17%), c'est-à-dire **4196 de plus** qu'en 2004 (25 067 voix, 0,15%). En Allemagne, *EDE* a reĉu **11 869** voix.

En 2009, *Europe Démocratie Espéranto* (voĉdonado en Francio) lokiĝas je la 16a pozicio inter 39 listoj kun **29 263** pozitivaj voĉoj (0,17%). La rezulto superas je **4196** tiu de 2004 (25 067, 0,15%). En Germanio, *EDE* ricevis **11 869** pozitivajn voĉojn.



El nia libroservo

Informoj



⇒ **La libroservo partoprenos en Marienburg la Mozellandan Esperanto-Semajnfino** (aranĝitan de Palatina Asocio en kunlaboro kun L.E.A., Bavelo kaj E.F.E.) **la 25an/27an de septembro 2009**.

Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu ĝin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libroservo (libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR 54500 VANDŬEVRE libroservo.efe@wanadoo.fr)

Nove alvenintaj libroj



1



2



3

1) Poŝamiko, 2007 - Bildvortareto, 42 p, **Allée/Kovats**, *Edukado.net*, **5,10 €**. Utila libreto por komencantoj, kiu klarigas la elementajn regulojn kaj enhavas bildan vortareton.

2) Nun mi komprenas, 2007 - Teatraĵetoj, 40 p, **Gubbins**, *B.E.A.*, **6,90 €**. 6 kelkpaĝaj teatraĵetoj por infanoj.

3) Ordeno de verda plumo, 2006 - Biografiaro, 274 p, **Pleadin**, *Grafokom*, **33,00 €**. Biografio de pluraj centoj de esperantlingvaj verkistoj.

Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDŬEVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)

- per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»

- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 eŭroj por adreso en Francio))

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97

BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo



Jusnaskitoj



1



2




3



4



5



6



7

1) Aventuro en mondo de ŝajnigado, Novelo, **Codjo**, *F.E.L.*, **6,00 €**. Impresoj de Afrika intelektulo malkovranta okcidentajn landojn!

2) Homarano, Esperantologio, 322 p, **Korĵenkov**, *Sezonoj*, **27,00 €**. Vivo, verkoj kaj ideoj de L.L. Zamenhof

3) Maigret eraras, Romano, 128 p, **Simeno**, *Sezonoj*, **12,00 €**, nova traduko de romano pri la enketoj de la fama polickomisaro.

4) La origino de la specoj, Scienco, 432 p, **Darwin**, *F.E.L.*, **24,00 €**. Traduko de fundamenta naturscienca libro, kiu dum la 19a jarcento revoluciis la koncepton pri la deveno de la specoj.

5) Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj, verkaro, 430 p, **Opo.**, *F.E.L.*, **24,00 €**. Kompilo de la verkoj de Lidia Zamenhof, kiu bedaŭrinde finis sian vivon en nazia amasmortigejo.

6) Serpento en la puto, originala romano, 184 p, **Nemere**, *Sezonoj*, **18,00 €**. Nova romano de la verkema hungara aŭoro.

7) Spitaj kiel hidrargo, Romano, 208 p, **Declerck**, *F.E.L.*, **20,00 €**. "Ĉi tiu romaneto roligas homojn, kiuj pri lingvoj interesiĝas, sed kiujn la vivo -postulema kaj akapara- kuntrenas, same kiel la "neinteresitojn" en diversajn direktojn kun apartaj komplikoj, propraj cirkonstancoj kaj solvindaj situacioj" (komento el la eldonisto).

✂.....

MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

-
-
-
-
-

al jena adreso:

S-ro/ino

-
-
-
-

En

la

Subskribo:

KAPABLECOJ DE MIRAKLAJ INFANOJ el Spirit tradukis Jaci

La budaistoj akceptas la ideon de reinkarnado, ke ĉiu homa estaĵo havas spiritan substancon, kiu ekzistas sendepende de fizika korpo kaj ke la psika estaĵo post morto de la korpo plu vivas por certa tempo, plejparte anonime reaperas en alia korpo. Dum ke la plej parto da esploristoj en la sfero de la reinkarnado serĉas en atestaĵoj la argumentojn de tiuj, kiuj venas kun siaj rememoroj je iliaj antaŭaj vivoj, la aliaj koncentriĝas je studado de tiel nomataj miraklaj ĝeinfanoj, kies nekutima talento en ia fako manifestiĝas jam tiom frue, ke ĝi estas klarigata kiel ia restaĵo el ia antaŭtempa vivo.

Al la plej miraklaj infanoj apartenis W.A.MOZART, kiu jam kiel 5-jaraĝa komponis, la unuan simfonion komponis kiel 8-jaraĝa, kaj la unuan operon en sia 12-jaraĝo.

El la pluaj tio estis Jean CARDIAC, franca knabo el la 18-a jc, konanta jam kiel 3-monata la alfabeton, kiel 6-jaraĝa jam parolis en 6 lingvoj. Al tiuj viciĝas eĉ blinda 4-jaraĝa knabo el familio de nigra servutula sklavo, konata kiel «blinda TOM», kiu vivis antaŭ la

intercivitana milito en Georgio kaj sukcesis ludi pianon, kiam li unuan fojon eksidiĝis al ĝi. La instruisto, kiu devis elprovi lin, proklamis, ke la juna mirakla pianisto scias pri la muziko pli multe ol ni scipovas ellerni. Sian unuan koncerton li aranĝis en sia 7-jaraĝo sed en sia 15-a jaraĝo aranĝis jam multajn koncertojn ne nur en Ameriko, sed eĉ aliloke en eksterlando.

Kelkaj homoj estas konvinkitaj, ke la scipovaj konoj de miraklaj infanoj estas la amasiĝinta spirita potencialo el antaŭaj vivoj. Tute unika ekzemplo de mirakla infano estas Christian Heinrich HEINECKEN. Tiu jam 10 monatojn post sia naskiĝo en 1721 sciis paroli. Kiel 2-jaraĝa laŭdire konis tutan biblion, 3-jaraĝa krom sia lingvo regis la francan kaj latinan lingvojn, estis sperta en geografio kaj en arkeologia kaj moderna historioj. Li mortis kiel 4-jaraĝa, kiel mirakla infano el Lübeck.



JOHAN WOLFGANG GOETHE

Ĉu li apartenis inter la Elektitajn ? Feliĉa konstelacio de steloj? Mistera astrologo ? Poemverkado kaj la vero - Horoskopoj de Goethe : ĉiamaj surprizoj - Granda Drako administras - Saturno estas potenca dio.

Sur romantika elrigardejo de Goethe en Mariánské Lázně ofte ni rememoras la famekonatan germanan verkiston, kiu ĉi tie tra ĉi tieaj vojetoj vagadis kun Ulrika von Lewetzow. Goethe estis ne nur literaturisto, sed ankaŭ famkonata scienculo kaj favoranto de astrologio. Ĉu li estis ankaŭ ano de iu el la sekretaj societoj ?

J.W.Goethe restadis en Bohemio, precipe en okcidentaj banlokoj, renkontiĝadis kun ĉeĥaj belartistoj kaj observis movon de ĉi-tieaj «ensekretiguloj».

Ni ekrigardu lian unikan horoskopon ! Li naskiĝis la 28.8.1749 en Frankfurt am Main, lia alveno estis indike anoncita per sekreta dokumento. Sed al kiu ? La infano naskiĝis en tempo, kiam la preĝej-horloĝo vidigis 12-an horon, precize ĉe la lasta sonbato. En la aŭtobiografio «Dichtung und Wahrheit» (Poemverkado kaj vero) Goethe ĝisvorte aludis : «La konstelacio de steloj estis superfeliĉa. La Suno staris en antaŭsigno de Virgulino kaj estis en sia taga kulmino.» Li daŭrigas per plua elkalkulo de konstelacio de planedoj kun rimarko, ke ankaŭ la influo de la Luno estas granda, ĉar ĝi estis en plenlumo kaj per sia kontraŭlumo des pli efikis. Ĝuste la bonaj aspektoj eble kaŭzis, ke la verkisto malgraŭ peniga akuŝo kaj malzorgema aliro fare de la akuŝistino, li restis viva.

Se ni rigardas la horoskopon de Goethe el hodiaŭa astrologia vidpunkto, ni povas dubi pri fatala influo de la Luno kaj kontraŭlumo entute, eble nin pli

ekinteresos Saturno. Ĝi simbolas ne nur la adverban ŝov-rampeman malbonon, sed ankaŭ atentigas je fatalaj obstakloj (la problemoj kun akuŝo), staras malantaŭ la nesufiĉeco de ardeco, subpremitaj sentoj. La kvadrato de Saturno kun Urano vidigas «duonigon» de l'animo, unu duono akceptas konservativajn opiniojn, subiĝas al severa societa ordo, respektas tradiciojn. Tiu dua estas liberala, strebas pri libereco, libero, ĝenado, difektado de konvencioj kaj pri ekstravaganco. La nedivenebleco de karaktero de la literaturisto estas konata, ofte li kondukis obstine kaj trofervorige. Eĉ la rilato de maljuna viro al Ulrika, juna knabino, estas verkaĵo de tiu ĉi ribelanta parto de l'animo, ĝi eliris el laborejo de Saturno. En la horoskopoj ni trovos eĉ eksterkutiman konfiguracion de tiel nomata Granda Drako, ĝi estas kreata per trigono de Neptuno, Jupitero, Plutono en akvaj signoj. Saturno en signo de Skorpio signifas mutjaran vivon, obstinecon, grandan intuicion kaj forpelas la morton. Eĉ ĉi tio realiĝis, Goethe ĝisvivis preskaŭ 83 jarojn, estis enterigita en princa kripto en Weimar.

Se ni ekrigardos atente lian obstinecon kaj energion, ni devas lin admiri. En la ampleksa verkaro ni malkaŝos etajn framasonajn kaj hermetikajn alegoriojn. Laŭ legendoj Goethe estis ano de kelkaj sekretaj societoj kaj ordoj. Ĉu tio estas vero aŭ ĉu temas nur pri libera daŭrigado de lia «belega poemverkado», tion prijuĝi devas ni mem !



ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2010 ĝis 2012

Nova kotizo: Post esplorado, nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevitaĵoj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

Se vi pagas vian kotizon al UFE, ni proponas al vi kompletigan kotizon je 16,70 eŭroj, kiu same ebligas al nia asocio atesti pri ricevita kotizo je 20 eŭroj (entute) por viaj impostoj.

La atestoj rilatas al pagoj ricevitaĵoj en 2009 por la imposto-deklaro de 2010.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2009, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la nova tarifo. Krome vi povas elekti inter la 3 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

Jaroj:	2010	2011	2012
Abono por adresoj en Francio:	14 eŭroj	14 eŭroj	14 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
Federacia kotizo:	6,50 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
Kompletiga kotizo kun atesto por UFE-membroj	16,70 eŭroj	16,70 eŭroj	16,70 eŭroj

Pagmanieroj

1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:

Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY

Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo.

La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:

ekzemple: abono Informilo + kotizo 2010 por 1208

2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de:

Esperanto France-Est sendita al jena adreso:

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2010, 2011 ktp. Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.

3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA

Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)

4. Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn

internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC :

PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)

Informoj pri niaj retejoj

Nia retejo <http://esperanto.alsacelorraine.neuf.fr> jam ne funkcias. Okazis ŝanĝoj ĉe nia servilo "neuf.fr", kiu nun postulas, ke la adreso finiĝu per perso.neuf.fr

Tial necesis krei novan retejon per jena adreso:

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr/>

Krome nia retejo estas daŭre atingebla per

<http://esperanto.france.est.free.fr/>

kaj la historio de nia federacio restas daŭre ĉe:

<http://esperanto.france.est.free.fr/historio.htm>

ni provu



rideti!...

Aŭtomobilisto iom laca deziras iom ripozi en haltejo de la aŭtovojo.

Li preskaŭ sukcesis ekdormi, kiam iu frapas ĉe vitraĵo de la veturilo petante...

“*Kioma horo estas?*” ...

Li okulumas al sia brakhorloĝo...

“*La dekkvara...*”

Li ĵus fermis la okulojn, kiam alia voĉo aŭdiĝas ekstere...

“*Ĉu vi havas la precizan horon?*”

Grumblante, li konsentas denove helpi...

“*La dekkvaran kaj kvarono!*” ...

Sed la afero komencas tedi lin...

Li skribas sur slipeton per dikaj literoj

“*Mi ne havas la precizan horon!*”

kaj ŝovas la paperpecon sub la antaŭan vitro-viŝilon...

Dek minutojn poste, li finfine profunde dormas... Je tiu momento iu frapas vigle ĉe la malekstra pordo kaj ekkrias...

“*Jen la dekkvara kaj duono!*” ...



Iu bus-uzanto, iom mense malsana, aĉetas ĉiumatene du biletojn, ĉiam por la sama itinero.

Kontrolisto, certagrade scivolema, petas informon:

“*Nu, io perpleksigas min... Kial vi aĉetas du kuponojn? Unu sufiĉus!*”

- *Simplas... Unu kuponon mi ŝovas en mian dekstran poŝon kaj la alian en la maldekstran... Se mi hazarde perdis unu, disponiĝus tamen la dua!*

- *Sed se vi perdis ambaŭ?*

- *Ne gravas, mi havas abonkarton ...”*



Suzana, sesjaraĝa, pridemandas sian avinjon:

“*Kiomaĝa vi estas avinjo?*”

- *Hem... karulineto, vere tre maljuna mi estas, mian aĝon mi eĉ ne plu memoras!*

- *Nu, avinjo, solvo ekzistas! Okulumu en via pantaloneto... En la mia troviĝas inform-etikedo, sur kiu mi povas legi ... ses jaroj!”*

Tri enkarcerigitoj provas forfuĝi...

La unua komencas eskaladi la eksteran muron de la prizono sed ŝtono brue falas teren.

“*Kie tie? laŭtvoĉas la kontrolgardisto...*”

- *Miaou... aŭdiĝas el la celita loko...*

- *Hej, denove tiu aĉa kato, kiel ĉiuvespere! grumblas la gardisto.*

La dua fuĝanto provas siavice sed bedaŭrinde sambruas lia grimpo...

“*Kiu tie? ... Kiu tie? ... ripetas la gardisto.*”

- *Miaou... miaou...!*

- *Nekredeble, mi finfine devos nepre forpeli tiun bestaĉon!*

La tria eskapanto volas ankaŭ atingi la supron de la muro, sur kiu jam sidas liaj du kunuloj... Malbonŝance ankoraŭ pli bruas la afero! La gardisto, pli kaj pli nervoziĝante:

“*Kiu tie? Kiu tie? Kiu tie?...*”

- *Kvietiĝu, sinjoro gardisto, temas denove pri la sama bestaĉo!”*



Ĵak, bovogardisto, impetas vigle en la drinkejon kaj laŭte demandas:

“*Kiu stulte ŝmiris verdkoloro mian ĉevalon?*”

Joe, la plej dika, la plej forta homo el la skipo stariĝas, ŝveligas la bruston kaj milde informiĝas...

“*Kulpas mi, junulo... Ĉu problemas al vi?*”

- *Hem... hem... tute ne! ... Mi tutsimple deziras scii, ĉu mi povas jam aldoni la duan tavolon!”*



Iu urbano, pro profesia deĵoro, devas transloĝiĝi kaj ĝuas novan domon en vilaĝo.

Cele tempoŝparon ĉiumatene, li alparolas kaparanon, sian najbaron:

“*Estimata Sinjoro Jozef, ĉu mi rajtus trapiedumi la kampon, sur kiu paŝtas via bovinaro por pli rapide atingi la bushaltejon je la sepa matene?*”

- *Memevidente! ... sed se la virbovo ekvidas vin, vi sukcesos kapti tiun de la sesa kaj duono!”*

Johaneto akompanas siajn gepatrojn en muzeo. Li malpacientiĝas konstatante, ke lia patro staras plurajn minutojn antaŭ la sama pentraĵo... Duonvoĉe li petas:

“*Paĉjo, ĉu mi rajtus uzi la teleŝaltilon por ricevi alian elsendan stacion?*” ...



Du amikoj renkontiĝas post la feritempo...

“*Nu, kie vi gastis dum tiuj du semajnoj?*”

- *La unuan mi estis en Alpoj... kaj la duan en gipso!”*



La juna Petro forlasas la lernejon fine de la posttagmezo kaj rehejmiĝas kun stranga mieno.

Lia patrino informiĝas pi tio...

“*Nu, panjo, nia instruistino demandas al ni ĉiumatene, kion oni manĝis la antaŭan vesperon... Mi respondas, ke mi kutimas ricevi lakton kam du panpecoj ŝmiritaj je butero... Ŝi iom miras pri tio...”*

La patrino iom cerbumas kaj proponas: “*Morgaŭ ci diros al ŝi, ke ni vespermanĝis anasajon je oranĝo...*”

Petro tre kontentus kaj je la sama demando far la instruistino li respondas fiere... “*Anasajon je oranĝo!”*”

- *Gratulon! Tio vere bongusti! Ĉu ci multe da manĝis?*

- *Du bovlojn! ...”*



Iu turismo haltas, trafante fanfaron ludantan fronte al fenestro, kies ŝutroj estas fermitaj...

Scivoleme li informiĝas:


“*Strangas tiu muzikludado antaŭ ŝlosita fenestro!*”

- *Nu, tion mi dediĉas al nia urbestro, kiu festas hodiaŭ sian naskiĝ-datrevenon!*

- *Ĉu?... Li estas malĝentila, li devintus almenaŭ malfermi la fenestron!*

Je tiu momento silentas la klarinetisto, kiu grumblas:

“*Mi ne povas esti en pluraj lokoj samtempe!”* ...



DISTRANĜULO



1 - Ŝmilblik-enigmo ————— ☆

Ĉiuj literoj de la normala teksto obeas al "neracia"alfabeto. Helpe: ĉiuj r iĝas s... ktp

b u f b u s u g : j u b u g u t h g ĥ o b k
 j h s p f d , ĉ h s u r k ĉ f d s u a ĥ ĝ f g
 o k p s h n f o , ĉ h j h ĉ s u r k ĉ f d
 h j ĥ p u p f o

Denove, *Coluche* (Koliŝ) ebligas al ni cerbumigi niajn legantojn, kiuj malkovros unu el liaj centoj da citaĵoj, unuavide humurplenaj sed fakte, tre ofte, saĝaj.

2 – mistera krado ————— ☆

Forprenu la literojn de la supra krado, vertikale alfabete ordigitaj kaj ŝovu ilin en la malsupran, je taŭga loko.


Vi malkovros citaĵon de *Sacha Guitry*, franca humoristo.

3 – vertikala enigmo ————— ☆

Helpe de la ĉi-subaj vorteroj, alfabete ordigitaj, malkovru la 23 vortojn, kies difino kuŝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, donos citaĵon de *Philippe Bouvard*, alia franca humoristo.

I	A	B	A	A	I	L	A	A	Ĉ	C	I	E
N	E	K	Ĉ	A	M	M	A	E	E	E	L	O
R	E	N	E	D	N	N	F	M	O	I	P	V
S	O	N	I	O	O		S	N	R	P	U	U
S		S	I	T	P		U	V	S	R		
V					R					S		

ak ano at cen cio cio co di ejo en ep eri et fe ĝu im ir ir iri
 ka ki ku lam le lo ma mo mo mo mo na nas ni ni nun of oj
 olo or oso pal pe pe pi po pos ri ro ro ro so te ti ti to to uĵ
 zu



- 1 + - - + - - manĝilo
- 2 + - - + - - malrespekti dignon
- 3 + - - + - - - - bruliga armilo
- 4 + - - + - - popolnombro
- 5 + - - + - - - - haŭto-malsano
- 6 + - - + - - diri denove
- 7 + - - + - - eligi el si idon
- 8 + - - + - - atmosfero
- 9 + - - + - - insekta vivulo
- 10 + - - + - - solene atesti (inverse)
- 11 + - - + - - aŭd-bruo de insekto-flugo
- 12 + - - + - - loko por moviĝi laŭ iu direkto
- 13 + - - + - - korp parto
- 14 + - - + - - ringoforma insulo
- 15 + - - + - - franca pioniro de fotografado
- 16 + - - + - - iĝi posedanto
- 17 + - - + - - - - aparato por telekontrolado
- 18 + - - + - - haveno el Alĝerio
- 19 + - - + - - sendinto de la papo
- 20 + - - + - - - - pet-skribo
- 21 + - - + - - - - lumvermo
- 22 + - - + - - - - deviga kontribuo
- 23 + - - + - - sentadoj de sencaj plezuroj

Solvoj de la lastaj enigmoj (146)

1 - Vertikala enigmo

Al kio utilis inteligenteco se stulteco ne ekzistus ?

2 – Ŝmilblik-enigmo

Superfluanta amo estas torento, kiu forlasas sian liton por eniri alian



freneza danco dum la IJK en Liberec



tranokto en "Cappadoce" por Rose kaj Cyrille !



dum la interkona vespermanĝo de OSIEK (Kondoros) !



promocii esperanton sur plaĝo de Vendeo (Francio) !



denove sukcesis la elstara renkontiĝo de Plouezec (Côtes d'Armor – Bretonio)